
# Voĉo el Bona Espero


Fazenda-Escola Bona Espero
77260 Alto Paraiso, Goiás, Brazilo.

somero 1977



## Karaj geamikoj de Bona Espero

Jen nia tria bulteno por havigi al vi novajn informojn pri nia Alta Paradizo. Verdire, ni nun disponas ankaŭ pri bona radio-sendricevilo per kiu ni povus radio-amatorece kontakti vin, sed ekzistas almenaŭ du malfacilaĵoj: 1) ne ĉiuj niaj geamikoj estas radio-amatoroj – 2) ni estas ankoraŭ "amatoroj" en tiu kampo kaj niaj kontaktoj kun la ceteraj kontinentoj estas tre sporadaj! Tamen, ni elsendas sur la frekvenco de 14266 Khz kaj nia voksignalo estas PY 2 CXG.



Sendricevilo ATLAS 210

## La ĉiutaga vivo de niaj infanoj

Laŭ bona kamparana tradicio, du el la knaboj ellitiĝas por melki la bovinojn antaŭ la matenmanĝo. Post la manĝo, ĉiu havas propran taskon, balai kaj ordigi parton de la granda domo kaj pretigi sin por la lerneja tago, kiu komenciĝas pli-malpli je la oka horo. (en Bona Espero ni rifuzas tute submetiĝi al la tiraneco de la horloĝoj).

La infanoj ricevas instruon en la portugala lingvo kaj Esperanto: matematiko, geografio kaj eduko "civila kaj morala", kiu enhavas i.a. elementojn de scienco. Je la dekunua kaj duono la malsatuloj fermas siajn librojn kaj iom ripozas antaŭ la tagmeza manĝo.

Je la unua kaj duono posttagmeze komenciĝas la diversaj taskoj (agrikulturaj, bestbredaj, k.t.p.). Tiu laboro, interrompata nur de la lunĉo je la tria, daŭras ĝis la kvina. Kiam la plenkreskuloj danke ekripozetas, la junaj korpoj de la knaboj plivigliĝas. Se la vetero permesas, ili ludas futbalon sur nia iom neebena kampo, naĝas en la baseno, kaptas fiŝojn aŭ rajdas ĉevalon. Kelkaj el ili preferas dediĉi iom da tempo el siaj privataj projektoj, ekz. bredado de kokoj. Post la vespermanĝo, la knaboj ofte laŭtlegas (pri sia legokapablo ili ja fieras), ludas damojn aŭ ŝakojn, aŭskultas diskojn, aŭ okupas sin alimaniere. Je la deka ili enlitiĝas, lacaj sed – oni supozas – sanaj kaj kontentaj.

*Por plenumi la peton de kelkaj personoj, kiuj ne povas imagi la vastecon de BE, ni publikigas mapon kun koncernaj klarigoj pri:*

Ni menciu krome la *Bucanha*-n ( pron. Bukanja), (10) densan praarbaron en nia sud-okcidenta angulo. La tuta teritorio kovras ĉ. 1380 hektarojn je meza altitudo de 1420 metroj.

## La teritorio de Bona Espero

Kiu alproksimiĝas al la teritorio de Bona Espero, havas antaŭ si maldekstre la imponajn konturojn de *Monto Baleno (1)*, 1860m., kiu formas parton de nia limo. La veturanto eniras nian bienon, kiam li transiras la ponton super la rivereto *Cobras (2)*. Preskaŭ tuj li vidas maldekstre, apud la vojon, monteton, kiu portas la nomon *Zamenhof (3)*: supre staras la busto. Se li irus laŭ la proksima flankvojo dekstre, li sin trovus ĉe la *akvofalo (4)*, sed ni supozu, ke li sekvas la ĉefvojon; post iom pli ol unu km. li preterpasas maldekstre la *flugkampon (5)*. Ankoraŭ unu kilometron kaj li vidas la vojon al *Salto (6)*, malnova biendomo, ĉirkaŭ kiu kreskas abundo da diversaj frukt-arboj. La ĉefvojo kondukas ĝis la piedo de Monto Baleno kaj trans nian limon, sed intertempe nia veturanto jam dekstreniĝis por atingi la *Pioniran Domon (7)* kaj la *Blankan Domon (8)*, kie la bonesperanoj loĝas, lernas kaj plejparte laboras.

Inter la du domoj fluas rivereto *Mulungú*, kiu ricevas la superfluon de la *baseno (9)*, la provizejo de nia akvo. (Mulungú estas la nomo da arbo, kies malmolaj ruĝ-nigraj beroj povas konsistigi belan kolĉenon).

La nordan limon de nia teritorio formas la rivereto *Rodeador*. La orienta limo laŭiras la Mulungú-n, escepte de la "elstaraĵoj" ĉirkaŭ la baseno kaj la akvofalo. La riveretoj *Salto* kaj *Lageado* formas la sudan kaj parton de la okcidenta limo. Monto Baleno markas la ceteran limon kun unu escepto, nomo, la terpeceto inter la riveretoj *Garioba* kaj *Divino* ne apartenas al Bona Espero.




E. Weide el Germanujo kun loka rikolto

## Ni adiaŭis kaj bonvenigis

Vizito de brazilaj kaj eksterlandaj gesamideanoj estas oftaj en BE kaj ne eblas mencii ĉiujn en nia bulten-letero. Tamen ni raportu, ke el tiuj, kiuj restis plurajn monatojn, ni adiaŭis Sally ( el Anglio), Tereza ( el Pollando) kaj Jack ( el Alasko).


El Australio alvenis geedzoj Trevor kaj Edith Steele. Inter la brazilaj novalvenintoj estas Arturo Velozo, unu el la fondintoj de BE, kaj Jonathan Bentes el Rio de Janeiro.

Kvar belaj vizaĝetoj aldoniĝis provizore al nia rondo. Dum ilia patrino veturis al Brazilio kun la kvina infano por naski baldaŭ la sesan, Josair (ok-), Josimar (sep-), Varlúcia (kvin-) kaj Valdemar (tri-jara), pasigis iom de tempo en Bona Espero.




**Niaj Pontoj. . .**

En regiono tiel abunda je riveretoj, estas nepre necesaj ligiloj kun la cetera mondo. Ja ĵus pasinta pluvsezono bedaŭrinde ne respektis tion. Detruitaj estas la pontoj super Divino ( (oni devas do vadi por atingi la fruktejon ĉe Salto) kaj Mulungù inter la du domoj. Pro alia akcidento estas aventuro transveturi Cobras: du el la kvin arbotrunkoj de tiu ponto estas rompitaj.





"Ponto" super Mulungù

**La semajnon de Internacia Amikeco** ni festis per inaŭguro de la busto de Zamenhof. Vestite en bluzoj portantaj la nomon "Bona Espero" ( donaco de la esperantistoj en Schwelm, Germanio), nia internacia grupo unue kolektis en la regiono sakojn da kvarcpecoj. Tiam ni stumble-ŝancele suprenportis niajn ŝarĝojn laŭ la kruta deklivo de la monteto nomita honore al Zamenhof. Supre ni konstruis el la belaj ŝtonoj indan fundamenton por la busto kaj ornamis ĝin per palmofrondoj. Fine ni ĉirkaŭstaris la monumenton dum fotoaparatoj eternigis la scenon.



**Helpis nin helpi**

Ankaŭ dum la periodo aŭgusto '76/ aprilo '77, multaj gesamideanoj el diversaj landoj subtenis nian laboron per sendado de mono kaj materialo. Publikigante la liston de tiuj personoj, ni povas certigi al ili, ke per ilia solidareco ni solvis plurajn problemojn kaj malfacilajn situaciojn kaj ke tio donas al ni kuraĝon persisti.

*El Brazilo:* L. Brieger 120Cr$; S. Chaves 100 Cr$; A. Borges 50 Cr$; C. Dionisio 100 Cr$; G. Soeira 1370Cr$; E.Grupo Porto Alegre 2100Cr$; O. Vaske 500 Cr$; E. Barbosa k.a. 1500 Crs; E.A. Silva 80 Cr$; V. Caetano 96 Cr$; V. Moreira 500 Cr$; J. Oliveira 500 Cr$; E-Grupo Uberaba 1000 Cr$; G.P. Freitas 1000Cr$; A. Rabelo 300 Cr$; F. Valle 96 Cr$.

*El Germanujo:* "Amika Rondo por la prospero de BE" 590 DM; G. Peek 150 DM; A. Kohler 2 $; E.Grupo Bremen 100 DM; E. Weide 1000 Cr$; H. Bellen 30 DM.

*El Italujo:* E-Grupo Bolonjo 100.000 liroj; E.Grupo Rimini 128.265 liroj.

*El Aŭstralio:* E-Ligo Okcidenta Aŭstralio 25$; Ges-roj Einihovici 200$.

*El Usono:* J. Lesh 2000Cr$; S-ro André 50$.

*El Danlando:* Familio Kehlet 3600 Cr$.

*El Luksemburgo:* E. Pleim 36$.

*El Belgio:* A. Orsolini 5$.

*El Britujo:* I. Nassif 55 Gld.

*

Entute ni ricevis la ekvivalenton de ĉ. 2.300 usonaj dolaroj.

Aldone, estas malfacile enlistigi ĉiujn pakaĵojn, kiujn ni ricevis ĉefe el Germanujo. Ili estis pli ol 40 kaj kreis seriozajn spacoproblemojn en la unuĉambra poŝtoficejo de urbeto Formosa ( je 190 Km de Bona Espero), kien ni devis veturi por ricevi ilin.

Tiuj pakaĵoj estis simple grandiozaj kaj ilia enhavo ĝojigis ne nur la bonesperanojn, sed dekojn da familioj en nia ĉirkaŭaĵo por kiuj ni aranĝis apartajn Krist-nasko-feston kaj Pasko-disdonadon.

Fine, danke al Familio Kehlet, malgranda generatoro aldoniĝis al niaj teknikaĵoj kaj ĝi ĉefe utilas por funkciigi lavmaŝinon kaj aliajn elektro-hejmajn aparatojn. Familio Kehlet ankaŭ pliriĉigis nian veturilaron per ĵipo Ford Rural (transmisio sur 4 radoj), per kiu oni povas alfronti la plej krutajn savanajn vojojn senĝene.

Ĝi estas luebla je modera prezo de la vizitontoj de BE, kiuj deziras ekskursi en nia regiono.

*AL ĈIUJ NIAJ GEAMIKOJ NI ESPRIMAS PLEJ KORAN DANKON KAJ SENDAS SINCERAJN SALUTOJN!*